

## DUA VATIKANA KONCILIO KAJ TRADICIO

„Piroteknika lumludo de la nova Pentekosto“ – eĉ tia vorto pri atendado de la kredantoj aŭdiĝis en aŭtuna episkopara sinodo en Romo, kiu devus estis ankaŭ respondo al novaj formoj de la vivo kaj transdonado de la kredo en periodo post kvindek jaroj ekde la komenco de la Dua Vatikana Koncilio.

Germana filozofo Robert Spaemann disponigis al taggazeto *Die Welt* intervjuon, en kiu li juĝas eklezion en la forpasinta poskoncilia periodo kiel „langvoran“.

Li estas konvinkita, ke per la koncilio komenciĝis epoko de degenero. „Ne estas bezono por glorige ĝojegi,“ li diras, „ekzemple pro la fakto, ke ankoraŭ dum la koncilio miloj da sacerdotoj forlasis sian servon.“



*Robert Spaemann*

Simile sin esprimis ankaŭ en nunjara episkopara sinoro Kiko Argüello, unu el kunfondintoj de Novkateĥumena vojo: „Ni – ĉiuj homoj – pro la timo, kiun ni havas antaŭ la morto, eldonitaj al la diabla ĉantaĝo kaj ni faras tion, kion volas la diablo: divorcoj, abortigoj, murdoj, mensogoj. Kristo per sia morto kaj resurekto venis tiun ĉi povon de la diablo forpreni. Kristo venkas la morton kaj

donas al la homo eblecon de la eterna vivo, la vivo, kiu venkas la morton. Estas tial tre grava, ke ni en tiu ĉi Jaro de la Kredo denove pripensu, kio estas la kredo. Kial Eŭropo perdis orientiĝon? Kial tio ĉi ĉio okazas? Kial la homoj forlasis la eklezion? Ni devas fari seriozan reflekson ankaŭ pri nia propra kredo kaj tion ni devas fari ĉiuj: pastroj, episkopoj, ekleziaj institutoj, parohoj. La Jaro de la Kredo estas providenca momento. Ni devas denove pripensi nian kredon, por ke ni progresu en la nova evangelizado.“  
*(Radio Vaticana, 18.10.2012)*

### **Aggiornamento – hodiaŭigo kondukanta al sekularigo?**

Robert Spaemann esprimas konvinkon, ke „la koncilio estis konsistaĵo de la movado, kiu obsedis la tutan okcidentan mondon – la kultura revolucio. Papo Johano la 23-a tiam diris, ke la koncilio estas „aggiornamento“ de la eklezio. Multaj tion komprenis kiel »adaptiĝon« al la mondo. Sed tio estis miskompreno. „Aggiornamento“ signifas estantigon de malakordo de la eklezio kaj la mondo, kiu ĉiam ekzistis kaj kiu devas ekzisti. Do vera malo de la adaptiĝo.“

La Sankta Patro Benedikto la 16-a en alparolo al vivantaj partoprenintoj de la Dua Vatikana Koncilio (12.10.2012) esprimis aktualecon de enporto de la kredlumo en la mallumon, kiu estas ordinareco de tiu ĉi mondo, ke „aggiornamento“ ne konsistas en finigo de la tradicio, sed en esprimado de ĝia vivkapableco. Ĝi ne signifas reduktion de la kredo laŭ ŝanĝiĝemaj modoj aŭ la publika opinio, sed – ĝuste tiel, kiel tio estis intenco de la konciliaj patroj – temas pri tio, enkondukadi nian samtempecon en samtempecon de Dio. Sed tion povas fari nur tiuj, kiuj estas profunde ankrigiĝintaj en Dio kaj en pureco de sia kredo ili sin lasas de Li gvidi – ne tiuj, kiuj elektas komfortan vojon kaj adaptiĝas al pasema momento. Kiel klare formulas dogma konstitucio pri la

eklezio *Lumen gentium* (n-ro 49), ĉiuj en la eklezio estas alvokitaj al la sankteco (kp. 1 Sol 4,3). Sankteco montras veran vizaĝon de la eklezio, ĝi lasas eniradi eternan „hodiaŭ“ de Dio en nian vivon, en samtempecon de la homo de la nuna tempo.

### Ĉu langvoreco de la eklezio?

„Jes“, diras Robert Spaemann, „la koncilio kaŭzis, ke la katolikoj langvorecis. La eklezio ĉiam batalis – per tio mi opinias ne la armean, sed spiritan batalon. Sed ĉiam la batalo. La apostolo Paŭlo parolas pri armilaro de la lumo, ŝildo de la kredo ktp. Hodiaŭ la vorto „malamiko“ kaŭzas indignon, la ordonon „amu viajn malamikojn“ oni tute ne plu povas uzi, ĉar neniun malamikon ni rajtas havi. Por tiel nomataj progresemaj katolikoj cetere ekzistas jam nur unu malamikeca fenomeno – la tradiciistoj. Vole nevole estas tio heredaĵo de la koncilio. Jes, ni la kristanoj ne devas respondi al ofendo de nia kredo kaj la eklezio per perforto, sed protesti ni eble rajtas.“

Al la klara sinteno de Jesuo, kiu ne timis havi la malamikojn – ja eĉ li libervole sin donis en iliajn manojn por krucumo – instigas nin komence la nunjara Jaro de la kredo la Sankta Patro Benedikto la 16-a:

„Sed ĉirkaŭ ni ĉiutage ni vidas, ke multaj homoj estas rilate al tiu ĉi mesaĝo indiferentaj aŭ ĝin rifuzas. En fino de de la evangelio de sankta Marko, kiun ni hodiaŭ aŭskultis, staras severaj vortoj de Resurektinto, kiu diras: »Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita; sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita« (Mar 16,16), perdos sin mem. Mi volas instigi vin, por ke ni enpenŝigu super tio. Konfido je efikado de la Sankta Spirito nin ĉiam devas gvidi al disvastigo de la kredo kaj heroldado de la evangelio, al la kuraĝa atestado de la kredo. Sed krom ebleco de la pozitiva respondo al la donaco de la kredo ekzistas ĉi tie ankaŭ risko pri rifuzo de la evangelio, neakcepto de la viviganta renkontiĝo kun Kristo. Tiun ĉi problemon jam formulis sankta Aŭgusteno en sia

komentario al parabolo pri la semisto: »Ni parolas, semas, disĵetas la semon. Ekzistas tiuj, kiuj malŝatas, kiuj oponas kaj kiuj mokas. Se ni timos antaŭ ili, ni havos nenion por dissemadi kaj en la tago de la rikolto ni restos sen la rikolto. Tial envenas la semo en la bonan grundon.« (Predikoj pri la kristana disciplino, 13,14) Rifuzo do nin ne povas deturni. Kiel kristanoj ni estas atesto de la fekunda grundo: nia kredo eĉ spite de nia limigo montras, ke ekzistas bona grundo, kie la semo de la Dia Vorto alportas abundajn fruktojn de la justeco, paco kaj amo, la nova homeco kaj la savo. Kaj la tuta historio de la eklezio kun ĉiuj problemoj pruvas, ke ekzistas bona grundo, ekzistas bona semo alportanta la fruktojn.« (Benedikto la 16-a en ĝenerala aŭdienco, la 24.10.2012)

### Malvenko de „reformistoj“ kaj „tradiiciistoj“ – venko de la kredantoj

En la koncilio, diras Robert Spaemann, venkis nek la unuaj, nek la duaj. „Ambaŭ flankoj ofte dum la koncilio praktikis preskaŭ politikan agitajon – precipe progresistoj. Kiam ili antaŭvidis, ke kun iu lasta propono ne konsentus plimulto, ili enkondukis en kompromisan version iun ĝeneralan klaŭzon, de kiu ili poste post la koncilio povus retiriĝi. Ofte ili laboris fakte komploteme. En koncilia interpretado dume ĝis hodiaŭ ili superas. Sed iompostioe akiras validecon alia maniero de konsiderado, iompostioe ni ĉesas mensogi en la propran poŝon. Ĉio tiel forvelkis – la homoj, kiuj neas Resurekton de Kristo, plu funkcias kiel profesoroj de la katolika teologio kaj sacerdotoj, kiuj predikas dummese. Tiuj, kiuj ne volas pagi ekleziajn impostojn, elfalis el la eklezio. Tie ĉi ja io ne estas en ordo.“

En sia antaŭparolo al volumo „*Zur Lehre des Zweiten Vatikanischen Konzils*“ (Al Instruo de la Dua Vatikana Koncilio), aperonta novembro de la nuna jaro en germana eldonejo Herder, montras la Sankta Patro Benedikto la 16-a al volbo de la Sankta Spirito transportanta ĉiujn – eĉ ĉe la kanonizitaj

sanktuloj kutimajn – homajn malfortecojn, kiuj aperas ankaŭ ĉe ekleziaj reprezentantoj en iliaj koncilioj:

„La konciliaj patroj ne povis kaj ne volis krei novan, alian eklezion. Ili ne estis tiucele plenrajtigataj, eĉ ne estis per tio komisiitaj. Ili estis konciliaj patroj havantaj la voĉdonon kaj decidrajton nur en dependeco de sia episkopeca ofico, do en povo de sankteco kaj sankteca eklezio. Tial ili ne povis kaj ne volis krei alian kredon kaj novan eklezion, sed al ambaŭ pli profunde ekkompreni kaj poste ilin fakte »renovigi«. Hermeneŭtiko de la rompo estas do absurda, ĝi kontraŭas al spirito kaj celado de la konciliaj patroj.“ (Radio Vatikana, la 11.10.2012) Do al rompo, kiu interrompus tradicion, kaj aŭ sur ĝi alfiksigus aŭ senkonsidere sur ĝi volus „reformi“ tion, kion ĝi jam neigas.

Konforme kun tio prezentas ankaŭ Robert Spaemann ekzemplojn, kiam oni eĉ ne per la homa malforteco kapablis tiun ĉi volbon de la Sankta Spirito difekti: „Hodiaŭ oni ofte diras, ke mankis nur malmulto, por ke la koncilio nuligu celibaton. Nune do oni devas tiamajn fetojn alkonduki al ilia realigo. Ĉe tio neniu el antaŭaj koncilioj defendis celibaton kun tia decidemo... Aŭ ankoraŭ tria ekzemplo: Ĉiu scias, ke la koncilio permesis uzon de la naciaj lingvoj dum la mesa liturgio. Sed apenaŭ iu scias pri decido de la koncilio, per kiu latinlingvo restas propra liturgia lingvo de la okcidenta eklezio. La Papo Johano la 23-a verkis unu enciklikon (*Veterum sapientia*) speciale pri graveco de la latinlingvo por la okcidenta eklezio.“

### **Ĉu ĉirkaŭiras la eklezion „spirito de la koncilio“?**

„Hodiaŭ verdire temas pli ofte pri tio, kion oni el koncilio faris,“ diras Robert Spaemann. „Espereble finfine iu komencos legi ĝiajn aŭtentikajn dokumentojn. Kiel skribis Joseph Ratzinger, jam fine de la koncilio ekaperis kiel timiga spirito io, kion oni poste nomis »spirito de la koncilio« kaj kio nur tre kondiĉe havis interligitecon kun ve-

raj konkludoj de la koncilio. La spirito de la koncilio – tio en la traduko signifis volon de la novigantoj. Ĝis hodiaŭ la tiel nomataj reformistoj en ĉiuj siaj eblaj reformecaj opinioj sin baraktas per la spirito de la koncilio, per kiu oni komprenas alkonformigon. Sed la hodiaŭo bezonas veran malon ol »seklarigon de la eklezio«, pri kiu plendis jam Luther. Ĝi bezonas tion, kion la papo nomis »senseklarigon«.

„Tial mi jam pli ofte akcentis neceson,“ diris en homilio ĉe inaŭguro de la nunjara sinodo la Papo Benedikto la 16-a, „reveni tiel dirite al »litero« de la koncilio, t. e. al ĝiaj tekstoj, por ke estu trovita ĝia aŭtentika spirito, kaj mi ripetis, ke en ili baziĝas vere heredaĵo de la koncilio. Apelacio al ĝiaj dokumentoj ŝirmas kontraŭ falo en ekstremaĉcon de anakronismaj nostalgioj aŭ kurego antaŭen kaj ebligas ekkompreni novecon en kontinueco. La koncilio inventis nenion novan materion de la kredo, eĉ ne volis ĝi anstataŭi tiun malnovan. Prefere ĝi zorgis pri tio, ke la sama kredo estu eĉ hodiaŭ plu vivata kaj en ŝangebla mondo ĝi estu la kredo vivanta.“ (Homilio de Benedikto la 16-a en inaŭguro de la Jaro de la Kredo, la 11.10.2012)

### **Ĉu la eklezio faru „paŝon malantaŭen“?**

„Principe ĝi devas fari tion,“ emfazas Robert Spaemann, „kion ĝi ĉiam faradis: ĝi devas konstante konvertiĝadi. Ĝi vivas el siaj sanktuloj, kiuj estas modelo de la konvertiĝo.“

La paŝo malantaŭen estas la paŝo al la konvertiĝo, al reveno al persona rilato al Jesuo Kristo, al lia eklezio kiel la putto.

„La eklezio“, diris en inaŭguro de la nunjara episkopara sinodo la Sankta Patro Benedikto la 16-a, „sentas sian devon sidiĝi ĉe la putto, kiel iam Jesuo en Sihar, kaj es-tantigi la Sinjoron en la vivoj de la hodiaŭaj homoj.“

„La tuta mondo sentas bezonon de renovigo de la kredo, al kiu minacas senlumigo. La hodiaŭa kultura konteksto malhelpas, por

ke ĝi en la homo enradikiĝu kaj sin povu esprimadi en la socio, por ke ĝi distingiĝu per klara enhavo kaj siaj konvenaj fruktoj. La hodiaŭa heroldado de la evangelio ekrilatas kun la unuaj kristanaj jarcentoj, al strebadoj de la misiistoj kaj suferdaŭo de multaj martiroj; ĝi devas esti „nova per sia fortiĝo, metodo kaj esprimo“ (*Johano Paŭlo la Dua, Alparolo al la 19-a ĝenerala kolektiĝo CELAM, Port-au-Prince, 9.3.1983*) kaj orientita precipe al la homoj, kiuj kvankam baptitaj, malproksimiĝis de la eklezio kaj vivas sen la kristana parktikado...“ (*Sinoda mesaĝo al Dia popolo, 26.10.2012*)

„Ni vidas, ke la tempo, en kiu ni vivas, estas rilate al Dio plu signita per forgeso kaj surdeco. Tial mi pensas, ke estas necese, ke ni akceptu tiun la plej fundamentan lecionon de tiu ĉi koncilio, do ke la fundamento de la kristanismo baziĝas en la kredo je Dio,

kiu estas triopeca Amo, kaj en persona kaj komunuma renkontiĝoj kun Kristo, kiu orientigas kaj gvidas la vivon. El tio rezultas ĉio cetera. Grava estas hodiaŭ – same kiel tion deziris la konciliaj patroj – denove kaj klare enrigardi, ke la Dio estas ĉeestanta, Li zorgas pri ni kaj respondas al ni. Kaj ke se mankas la kredo je Dio, ruiniĝas tio fundamenta, ĉar la homo perdas sian profundan dignecon eĉ tion, kio pruntedonas al lia homeco grandecon kontraŭ ĉiu reduktismo. La koncilio memorigas al ni, ke la eklezio en ĉiuj siaj elementoj havas la taskon, mision transdonadi vorton de la amo de Dio, kiu savas, por ke estu aŭdita kaj akceptita Dia alvokiĝo, kiu inkluzivas nian eternan beatecon.“ (Benedikto la 16-a en ĝenerala aŭdienco, la 10.10.2012.) ■

*P. Michael Maria*